

34-a Jarkolekto * Marto 2020 * N-ro 116



HUESA

**Piede de monto, kiu similas dormantan
drakon.**

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
COLABORADORES: Alejandro BURGOS ESCALANTE
Vicente HERRERA COBO
Julio VELÁZQUEZ
Carlos SPINOLA
Juan GARCÍA DEL RÍO

ENHAVO

Carta a los Lectores	3
Letero al la Legantaro	4
Esperanto en Andaluzio	9
Juan Latino, la sklavo kiu sidigis sur katedro	7
Lingva Angulo.....	11
Poezia Angulo	17
Folioj por Praktikado	20
Komikso.....	23
Turismi en “Huesa”	27
Paĝoj pri Nia Historio: <i>Manuel Fraile Corona</i>	31
Flamenko: “ <i>El Pele</i> ”	34
Andaluzia Kuirarto	36
Fervojista Angulo	38
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio.....	41
Krucvortenigmo.....	43
Rebuso	44
Solvoj.....	45
Humuro	46

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

CARTA A LOS LECTORES

La cuarentena motivada por el coronavirus ha sido la causa de la anulación de muchas actividades esperantistas de cara al exterior, como congresos y encuentros. Pero por el contrario, este aislamiento ha ayudado a algunas asociaciones y proyectos a actualizarse. Eso es lo que le ha ocurrido a nuestra revista.

En estos dos meses de actividad frenética hemos podido editar 3 números, lo que ha supuesto en primer lugar que nos hayamos puesto al día en su edición. Pero no sólo se trata de ponerse al día en cuanto a la publicación de los números, a partir de éste también pretendemos dar un impulso a nuevos contenidos.

Como podréis ver las páginas de gramática se han aumentado y además ya se editan en español, ésta era una vieja petición de algunos lectores. Por otra parte, hemos creado una nueva sección *Fervoja Angulo*, que tiene como objetivo presentar colaboraciones dedicadas al mndo del ferrocarril, aprovechamos para ello la reciente creación de HAFE (Grupo de Amigos Ferroviarios Esperantistas). Pero quizá lo que resulte más llamativo es la publicación en las páginas centrales de la revista de un cómic en esperanto. Se trata de un antiguo proyecto dar entrada en *Gazeto Andaluzia* al, así llamado, noveno arte, el objetivo es hacer más atractiva nuestra publicación a los jóvenes esperantistas andaluces.

Por último, tan sólo queda agradecer a los nuevos colaboradores de la revista, que poco a poco va agrandado su número. Esperamos que, a partir de ahora, la cita de *Gazeto Andaluzia* con sus lectores se produzca con total puntualidad y que el contenido de la publicación sea del agrado de todos.

¡ Buena Lectura !

La redacción de GAZETO ANDALUZIA



LETERO AL LA LEGANTARO

La kvaranteno pro la koron-virusa malsano estis la kaŭzo de la nuligo de multaj esperantistaj agadoj, ĉefe tiuj rilataj al kongresoj kaj renkontiĝoj. Male, tiu san-izoligo sendube helpis la revivigon de kelkaj asocioj kaj la aktualigon de multaj projektoj. Ĉi tio okazis rilate nian revuon.

Dum ĉi tiuj du lastaj monatoj nia eldona agado estis intensa, ĉi tiel ni sukcesis eldoni tri numerojn de la revuo kaj finfine senprokrastigi ĝin. Tamen, ni ne nur atingis eldoni akurate la revuon, ni ankaŭ aperigas ekde nun novan enhavon. Kiel vi povos vidi, ni plivastigas la paĝojn celantajn diskonigi gramatikajn erojn de nia lingvo. Tiuj paĝoj estas prezentataj en la hispana lingvo, jen antikva peto de niaj legantoj. Ni ankaŭ enirigis novan branĉon, temas pri *Fervoja Angulo*, tie ni celas aperigi kunlaboraĵojn rilataj al fervojoj, do, ni profitos la ĵusan fondiĝon de la Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistoj. Laste, kaj eble jen la plej okulfrapa nova branĉo, ni aperigas komikson sur la centraj paĝoj de la revuo. De antaŭ kelkaj jaroj ni celis aperigi branĉon dediĉitan al, tiel nomata, *naŭa arto*. Ni deziras ankaŭ allogi nian revuon ĉe la junaj andaluziaj esperantistoj.

Fine, nur restas danki al la novaj kunlaborantoj, kies nombro iom post iom pligrandiĝas. Ni esperas, ke ekde nun, la apero de *Gazeto Andaluzia* estu tute regula kaj akurata. Ni ankaŭ deziras, ke la enhavo de la revuo plaĉu al ĉiuj. Do,

BONAN LEGADON !

La redakcio de GAZETO ANDALUZIA



ESPERANTO EN ANDALUZIO




➤ Agadoj dum la Kvaranteno.

Dum la kvaranteno (san-izoligo) ne realiĝis aŭ prokrastiĝis ĉiuj esperanto-agadoj en Andaluzio, pro la alarmo-stando dekretita de la hispana registaro. Do, oni nuligis la foiron pri lingvoj de la Universitato de Seviljo, okazunta dum la monato majo, ĉi-jare Sevila Esperanto-Asocio planis partopreni en tiu foiro. Same, la naskiĝanta grupo de Granado prokrastigis ĉiujn agadojn kaj renkontiĝojn por praktiki la internacian lingvon dum ĉi tiu kvaranteno. La Hispana Kongreso de Esperanto, okazunta fine de aprilo kaj komence de majo en Santandero, prokrastiĝas ĝis la mezo de la monato oktobro, do se kelka andaluzia esperantisto planas ĉeesti, li/ŝi ankoraŭ povas ĝui tiun renkontiĝon.

Tamen, naskiĝis aliaj novaj agadoj ĉefe en interreto. Do, okazis renkontiĝoj en la reto, ĉefe paroladoj pere de kamerao kaj mikrofono. Laŭ informo de la respondeculo de *Tubaro.net* -retejo kiu havigas al ni videojn en esperanto-, dum ĉi tiuj tagoj pligrandiĝis la spektroj de filmetoj en nia lingvo.

Laŭ sciigo de Pablo Busto, mastrumanto de la retejo, oni ricevis pli-mapli saman kvanton da potagaj vizitoj ekde decembro, sed la vizitoj estas pli long-daŭraj. *Tubaro.net* kreskis ankaŭ antaŭ la kvaranteno, do estas malfacile kalkuli ekzakte kiom da tiu kresko ŝuldiĝas al la san-izoligo, tamen eblas kalkuli, ke ekde novembro 2019 la vizitoj al la retejo kreskis 30% monate, do oni povas pensi, ke iom pli ol duono el tiu kresko ŝuldiĝas al koron-viruso.

Jen klariganta statistiko pri vizitoj kaj daŭro-tempo de tiuj vizitoj:



➤ Naskiĝas la Hispana Amikaro de Fervojistaj Esperantistoj.

Pasintjare okazis en Malago la internacia kongreso de IFEF, la esperantista federacio kiu unuigas la fervojistojn en Esperantio. Antaŭ dekoj da jaroj ekzistis en Hispanio vigla asocio de esperantistaj fervojistoj, tamen tiu hispana sekcio malaperis. Do, IFEF instigis la andaluzian E-asocion al la fondiĝo de grupo de amikoj de esperantistaj fervojistoj, tio estas ne-oficiala asocio sed ja amikaro kiuj ŝatas la fervojan mondon.

Kompreneble la andaluzia asocio akceptis la proponon, ĝi sendube estas bona rezulto de la pasintjara kongreso en Malago. Do, ĉi tiu hispana amikaro de esperantistaj fervojistoj jam ekfunkcias kaj ekde ĉi tiu numero aperas *“Fervoja Angulo”* ene de ĉi tiu revuo. Ni profitos tiujn paĝojn por paroli pri fervojoj, komunik-linioj kaj ĝenerale pri vojaĝoj per-trajne.


Se vi deziras aliĝi al ĉi tiu amikaro, bv. kontakti kun:

- fervojista@esperanto.ac

JUAN LATINO

La sklavo kiu sidiĝis sur katedro

Ne ekzistas certigitaj datumoj pri la naskiĝ-loko de *Juan de Sessa*, laŭdire li naskiĝis en la kordova vilaĝo *Cabra* en la jaro 1518. Tamen, aliaj historiistoj asertas, ke li estis kristano de Etiopio, kvankam per tiu geografia nomo estis konata mezepoke ne nur la nuntempa Etiopio sed ankaŭ grandajn regionojn de la afrika kontinento. Sed tutcerte, li mem, aŭ lia praularo -eble lia patro- estis afrika sklavo venigita en Andaluzion per portugalaj sklavo-ŝipoj kiuj atingis sian homan varon en la gvineaj marbordoj kaj transportis ilin en Eŭropon kaj en Amerikon. Certa estas la fakto, ke *Juan de Sessa* servis en granda domo en Baeno (Kordovo) kies mastro estis *Luis Fernández de Córdoba*, dua duko de Sessa -pro tio la kromnomo de la sklavo *Juan*-.



Juan Latino 1518 - 1596

Juan estis iomete pli aĝa ol *Gonzalo*, filo de la duko, tamen inter ili naskiĝis grandegan amik-rilaton. Karolo la 1-a, hispana imperiestro, sendis al la duko de Sessa en Romon, por agadi kiel ambasadoro ĉe la Papo. La ceteraj familianoj tiam, edzino kaj filaro, decidis iri en Granadon, dum la oficiala restado de la duko en Romo. Tiutempe, kaj ankaŭ nun, Granada estis urbo kun prestiĝa universitato, tie instruis la plej famaj profesoroj, ĉefe pri humanistaj sociaj sciencoj, tio estas: helen-latina civilizo kaj antikvaj klasikaj literaturoj.

Gonzalo, la dukido, komencis siajn studojn en la Universitato kaj tien li iris akompanita de sia sklavo (kaj amiko) *Juan*. La tasko de la sklavo estis nur akompani la mastron al la lerno-ĉambroj, tamen li ne rajtis eniri tien. Tamen, *Juan* atente aŭskultis la lecionojn trans la pordoj kaj li enmiksiĝis tiome en la studadon, ke la tuta familio *Sessa* akceptis kaj eĉ instigis lin al la daŭrigo de la studoj. Fine, la universitataj aŭtoritatuloj tion ankaŭ akceptis.



La urbo Granado laŭ gravuraĵo de la jaro 1548

Juan de Sessa, jam emancipita, finis la humanistan karieron en la Universitato kun imponaj rezultoj kaj li baldaŭ atingis katedron pri gramatiko kaj klasika literaturo en la Universitato mem. Li tradukis tekstojn el la latina kaj la greka klasika lingvoj dum tiuj jaroj kaj li verkis kelkajn librojn omaĝe al reĝoj, papoj ka nobeluloj.


Pri la prestiĝo kiel erudiciulo de *Juan Latino* oni devas substreki la fakton, ke eĉ *Miguel de Cervantes* parolas pri li en la ĉefverko "*La Inĝenia Hidalgo Don Kihoto de la Manĉo*". *Cervantes* skribas jenon en la prologo de la famega verko:

*Ĉar ĉielo ne deziris
ke vi havu la kapablon
de la negro Juan Latino
nu, forgesu latinaĵojn.*

Ankaŭ estas grave diri, ke li edziĝis al *Ana de Carloval*, filino de la administranto de la Dukejo de Sessa kaj grava municipa aŭtoritatulo de la urbo Granado, sendube la socia deveno de la eksa sklavo tute ne influis sur lia akcepto ene de socio tiel fermita kiel tiu hispana mezepoka, tiam la familia deveno estis grava faktoro rilate la socian pozicion de la enloĝantoj de urbo.

Juan Latino estis la aŭtoro de multnombra verkaro, li ĉiam laŭdis per ĉi tiuj verkoj la tiutempajn gravulojn, tiel li omaĝis al Duko de Sessa, al la granada ĉefepiskopo, ktp. Do, li estis elstara klasika filologo, poeto, muzikisto, grava kultura elstarulo en la urbo Granado dum la 16-a jarcento kaj la unua kaj sola eks-sklavo kiu atingis postenon kiel katedratiiston en la Universitato.

La geedzoj havis tri filojn. *Juan Latino* forpasis en la jaro 1596, respektata kaj amata de siaj multnombraj disĉiploj kaj de la tuta granada socio. Li estis entombigata en la preĝejo de Sankta Ana kaj Sankta Gil en Granado, apud la rivero Daŭro.



Kovrilo de libro, sur ĝi aperas latinlingve kiel aŭtoro:
Magistrum Ioannem Latinum
(Majstro Johano la Latina)

ALIĜU AL ***Andaluzia Esperanto-Unuiĝo***

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- **BANKIA**

ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2020

HAZTE SOCIO DE LA ***Asociación Andaluza de Esperanto***

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, aquí tienes tu asociación.

Para hacerse socio contacta con: cordoba@esperanto.ac
Cuota anual: 20 € que se pueden abonar en la cuenta siguiente:

- **BANKIA**

ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del nuevo socio.
- Concepto: Cuota 2020

Lingva Angulo

USO DEL PARTITIVO “DA”



Siempre subrayamos la idea de que no deben traducirse ni frases, ni palabras directamente del español al esperanto. Aunque sepamos que la traducción de una palabra al esperanto, puede ocurrir que no se utilice ese vocablo en esperanto para una construcción determinada. Este es el caso de la preposición “DE”.

Puede parecer fácil para un hispano-parlante traducir “DE”, más que nada porque en esperanto se dice exactamente igual: *de*. Pero claro, esto es así sólo cuando nos estamos refiriendo al “de” que expresa posesión.

- El libro de mi amigo.
La libro de mia amiko.
- Tuve que obedecer las órdenes de mi jefe.
Mi devis obei la ordonojn de mia ĉefo.

En este caso la preposición “de” -tanto en español como en esperanto- se refiere a una posesión, a una propiedad. En los ejemplos vistos el libro pertenece a mi amigo y las órdenes a mi jefe.

Sin embargo el uso de “de” se complica un poco cuando esta preposición puede tener otros usos distintos al de expresar una propiedad, por ejemplo en el caso del “de” en construcciones partitivas. ¿*Qué es eso?* Existe una construcción partitiva cuando se expresa la idea de una magnitud de cosas o de entes y posteriormente se informa de la categoría a la que pertenecen esas cosas o entes, uniéndose ambas

partes de la construcción en la lengua española por medio de la preposición “de”, mientras que en esperanto se usa la preposición “da”. Veamos algunos ejemplos:

- Miles de personas asistieron a la manifestación.
Miloj da homoj ĉeestis la manifestacion.
- En el jardín hay una gran abundancia de flores.
En la ĝardeno estas granda abundo da floroj.

En este caso, la preposición española “de” no se refiere a una propiedad, está claro que los *miles* no son propiedad de *personas*, sino que simplemente están compuestos por ellas. Así que en este caso de construcciones partitivas la preposición española “de” se traduce en esperanto por “da”.

Volvamos a ver la estructura de las construcciones partitivas en esperanto: cantidad + *DA* + categoría de los objetos o entes integrantes.

- *Mi aĉetis novan domon kontraŭ kelkaj miloj da eŭroj.*
He comprado una casa nueva por algunos miles de euros.
- *Mia patrino aĉetis litron da lakto por niaj najbaruloj.*
Mi madre compró un litro de leche para nuestros vecinos.
- *Abundo da pluvado provokis grandajn damaĝojn.*
Una abundancia de lluvias provocó grandes daños.

Como hemos visto la cantidad no tiene que ser exacta, puesto que también pueden emplearse en la construcción partitiva términos como *multe*, *abundo*, *aro*, pero lo que sí es cierto es que en un momento dado y con los datos necesarios siempre podría sustituirse por una cifra concreta.

Por otra parte, la primera parte de la construcción partitiva no puede ser un numeral, es decir, no puede tratarse de *unu*, *du*, *tri*....*mil*, ya que si así fuera entonces simplemente diríamos:

- *Ĉi tie renkontiĝas dek amikoj.*
Aquí se reúnen diez amigos.

Sin embargo, si el numeral lo convertimos en un sustantivo, entonces sí nos encontraremos ante una construcción partitiva, en ese caso sí utilizaremos la preposición *da*.

- *Ĉi tie renkontiĝas deko da amikoj.*
Aquí se reúne una decena de amigos.

En algunos de los ejemplos propuestos hemos visto que la construcción partitiva puede ser el objeto directo en la oración, ejemplo:

- *En mia biblioteko mi havas milojn da libroj.*
En mi biblioteca tengo miles de libros.
- *Por aĉeti novan domon vi devos elspezi milojn da eŭroj.*
Para comprar una casa nueva tendrás que gastar miles de euros.

En estos casos el término que va en acusativo (-n) es la primera parte de la construcción partitiva, es decir la que expresa la cantidad, pero nunca la que expresa la categoría de objetos o de entes.

Uso de *DA* en preguntas

Si queremos saber qué cantidad constituye un grupo de cosas (por supuesto cantidad exacta o aproximada), también tendremos que utilizar la estructura partitiva con *DA*, aunque a menudo ese *DA* no aparecerá luego en la respuesta. Vamos a explicarlo mejor con algunos ejemplos:

- *Kiom da homoj loĝas en via domo?*
¿Cuántas personas viven en tu casa?

Hemos usado una construcción partitiva:

KIOM (pregunta por una cantidad) + *DA* + *HOMOJ* (categoría de los entes u objetos por los que hemos preguntado).

A esta pregunta podemos responder de dos maneras:

- a) Aportando el dato exacto:
 - *Tri homoj loĝas en mia domo.*
Tres personas viven en mi casa.
- b) Indicando un dato no concreto compuesto por cantidad+*da*+categoría del ente:
 - *Malmulte da homoj loĝas en mia domo.*
Pocas personas viven en mi casa.

Veamos más ejemplos:

- *Kiom da fruktoj produktas la oranĝ-arbo?*
¿Cuánta fruta produce el naranjo?
- *La oranĝ-arbo produktas grandan abundon da fruktoj.*
El naranjo produce una gran abundancia de frutos.
- *Kiom da homoj vizitis la monumenton pasint-jare?*
¿Cuántas personas visitaron el monumento el año pasado?
- *Bedaŭrinde, malmulte da homoj vizitis ĝin.*
Lamentablemente, pocas personas lo visitaron.

Uso de Grupo ¿Un caso especial?

Veamos la siguiente frase, que es totalmente correcta:

- *En mia urbo ekzistas grupo de esperanto, ĉiusemajne renkontiĝas en trinkejo nombra grupo da esperantistoj.*
En mi ciudad existe un grupo de esperanto, cada semana se reúnen en un bar un numeroso grupo de esperantistas.

En la primera frase leemos “*grupo de esperanto*” y en la segunda “*grupo da esperantistoj*”. ¿Por qué ocurre esto? ¿La palabra *grupo* es especial? No, ni mucho menos. Lo que ocurre es que en la primera frase aparece “*grupo de esperanto*” con la preposición *de*, en tanto que se indica una característica del grupo, no se menciona nada relativo a una cantidad. Es decir, se utilizará el *de* en tanto a que se especifica qué grupo es.

Sin embargo en la segunda frase, cuando decimos “*grupo da esperantistoj*”, ya sí nos estamos refiriendo a una cantidad de algo concreto como son los esperantistas, es decir cuantificamos indicando que es un grupo, palabra que tiene una acepción también referida a cantidad, concretamente un número no inferior a tres.

Otro caso en el que también utilizaremos la preposición “*da*”, puesto que nos encontramos ante una estructura partitiva es el caso de “*glaso da vino*” (vaso de vino). En este caso concreto “*glaso*” se refiere principalmente a una cantidad, es decir, quiero beber un vaso, o dos, o tres de vino, así que la estructura partitiva está clara: cantidad (vaso) + *da* + materia, objeto que contamos. Hay que diferenciar “*glaso de vino*” de “*glaso da vino*”, en este último ejemplo nos estamos refiriendo a que el vaso está diseñado para contener vino, en español podría traducirse como “vaso para vino”. Veamos algunos ejemplos:

- *En la trinkejo li trinkis multajn glasojn da vino.*
En el bar bebió muchos vasos de vino.
- *Ofte mi proponas glason da vino al miaj invititoj.*
A menudo ofrezco un vaso de vino a mis invitados.

En estos dos primeros ejemplos está claro que con *glaso* nos estamos refiriendo a una cantidad.

- *Ne povas manki glaso de vino en via kuirejo.*
No puede faltar un vaso para vino en tu cocina.
(En este caso, a lo que nos referimos es a la cualidad del vaso -ser apto para vino- y no, a una cantidad concreta de bebida.)

Por último vamos a hablar del uso de “*iom da...*”. En este caso la estructura partitiva es la misma, simplemente que cuando en la primera parte de la estructura hablamos de cantidad utilizamos “*iom*” (algo). Veamos algunos ejemplos:

- *Aldonu iom da oliv-oleo en vian salaton.*
Añade algo de sal a tu ensalada.
- *Kiom da mono vi havas en via banko-konto?*
¿Cuánto dinero tienes en tu cuenta bancaria?

Esperamos que haya quedado un poco más clara esta cuestión, pero ahora es el turno del lector, así que te proponemos adivinar cómo usar correctamente las preposiciones *de* o *da* en las siguientes frases:

- *La aŭtomobilo ____ mia amiko kostas multajn milojn ____ eŭroj.*
- *Kiom ____ mono kostas la aŭtomobilo?*
- *Oni povas diri, ke li estas ebriulo, li trinkas kelkajn glasojn ____ viskio dum la tago.*
- *La profesoroj decidis krei grupon ____ mineralogio, tie renkontiĝos grandan grupon ____ mineralogoj.*
- *Sur la arbo troviĝas multe ____ birdoj.*
- *En la urbo loĝas multaj esperantistoj, ili havas afablan grupon ____ esperanto kaj de tempo al tempo renkontiĝas tie kelke ____ ili.*

(Solvoj sur la paĝo 33-a)

Poezia Angulo

MIA HUESA ĤAENO

Tie mi naskiĝi jam ne povas
sed tie mi vere morti volas

Ĥaeno, tero de miaj revoj
Ĥaeno, tero de miaj pensoj

Tero plena je mildaj riveroj
tero plena je grandaj kasteloj

Huesa kruta alta montaro
Huesa vasta oliv-arbaro

vilaĝeto gepatra, geava
ĉiama bonodoro kampara

stratoj de junaĝaj ludoj belaj
lokoj de perditaj amoj veraj

longan tempon mi triste forestis
sed ĉiam vi tamen kun mi restis

apudriveraj sablaj ludadoj
amuzaj surkamparaj kuradoj

pri viaj someraj varmaj kortoj
songigas min viaj lokaj vortoj

fruktajn odorojn brunajn aŭtunojn
ĉiam revadas mi viajn gustojn

longaj babiladoj kun amikoj
ĉeestadas malnovaj muzikoj

vinberoj, olivoj kaj granatoj
tritiko, maizo, verdaj faboj

klaraj printempaj infanaj tagoj
longaj bonodoraj promenadoj
fridaj vintroj en domkortaj plankoj
apudkamenaj kunsidaj tagoj
ĉiam ĉeestas kora rilato
pli forta ol tiu de la frato
tiu vorta kanto por vi estu
vi nepre ĉiame en mi restu.

Juan García del Río



RENOVIĜIS LA TTT-PAĜO DE *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Vizitu: www.esperanto.ac

Tie vi trovos informojn pri kiamaniere lerni Esperanton, vi konos kelkajn agadojn de nia asocio, vi scios pri la manieroj kontakti kun la loka grupoj de Andaluzio.

Kompreneble, ni ankaŭ disvastigas la andaluzian kulturon. Sur la branĉo *Andaluzio, jen via celo!* Vi legos pri la ebloj turismi en Andaluzio, ties historio, arto, pejzaĝoj, ktp. Kaj se Vi interesiĝas pri muziko, sur la sekcio *Pri Flamenko*, vi trovos datum-bazon pri flamenkaj kantistoj kaj gitar-ludistoj.

Do, vizitu ofte: www.esperanto.ac

Folioj por Praktikado

Recuperamos el nombre de la primera revista del Grupo de Esperanto de Málaga, que se editó en los primeros años de la década de los '80, para crear una nueva sección en nuestra revista, que tiene como objetivo presentar un texto fácil para los lectores que están aprendiendo Esperanto y así poderles mostrar con ejemplos algunas construcciones gramaticales que les pueden ser de interés.

Ni reprenas la nomon de la unua revuo de la Grupo de Esperanto de Malago, eldonita dum la unuaj jaroj de la 8-a jardeko, por krei novan sektion en nia revuo. La celo de ĉi tiu nova branĉo estas prezenti facilajn tekstojn al tiuj legantoj kiuj eklernas la internacian lingvoj kaj tiel montri al ili ekzemplojn pri gramatikaĵoj kiuj povas esti utilaj.

LA KORON-VIRUSO EN LA FEROA INSULARO

La Feroa Insularo estas la unua eŭropa teritorio jam libera de la koron-viruso. Entute, dum ĉi tiuj lastaj monatoj, 187 homoj malsaniĝis, feliĉe, neniuj el ili forpasis. Feroa insularo, aŭ Ferooj, estas aro da insuloj, 18 entute, tie loĝas 48.000 homoj. El la administracia vidpunkto, ili dependas de Danio, tamen ili estas aŭtonoma teritorio. Danio nur okupiĝas pri la ekstera politiko kaj la sekureco de la insularo per cent policianoj.



La plej populara sporto en Ferooj estas futbalo. Ili havas propran internacian teamon kaj tie, de tempo al tempo, okazas internaciaj futbal-matĉoj, ĉefe okaze de la Eŭropa Futbal-Konkurso. Do, la matĉoj

baldaŭ komenciĝos, kvankam spektantoj ankoraŭ ne rajtas eniri en la stadionon por ĉi tiel eviti amasigi popolon en malgranda loko.

Rilate la lingvon de la insularo, en Ferooj oni parolas la feroan lingvon. Ĝi devenas de malnova norvega lingvo. La unuaj enloĝantoj de la teritorio estis irlandaj monaĥoj en la jaro 625. Ekde la 9-a jarcento tie loĝis ĉefe norvegoj. Kiel dirite, Ferooj estas aŭtonoma regiono kaj en la 21-a jarcento ili celas al suvereneco.

Aprender esto puede ser útil:

- *Esti libera de...* = estar libre de... (también puede usarse la preposición “je”. *Neniu estas libera je / de suferoj.* = Nadie está libre de sufrimientos. Se pueden usar ambas preposiciones *je* o *de*.
- *Neniu el ili.....* ninguno de ellos. Con la misma construcción *multaj el ili.....* muchos de ellos.
- *Insularo estas aro da insuloj* = un archipiélago es un conjunto de islas. Hay que recordar la estructura partitiva vista en la página 9 de este mismo número: La estructura es la siguiente: Cantidad (*aro*) + *da* + objeto que se cuenta (*insuloj*).
- *El la administracia vidpunkto* = desde el punto de vista administrativo. *El mia vidpunkto* = desde mi punto de vista.
- *Danio okupiĝas pri la ekstera politiko* = Dinamarca se ocupa de la política exterior. *Okupiĝi pri* = ocuparse de (sobre) algo. Por ejemplo: *Mia amikino laboras ekster hejme kaj mi okupiĝas pri purigado de la domo* = Mi amiga trabaja fuera de casa y yo me ocupo de la limpieza de la casa.
- *De tempo al tempo* = de vez en cuando. *Ĉu vi ofte legas librojn? Ne, bedaŭrinde mi ne havas multe da tempo, mi povas nur okupiĝi pri tio de tempo al tempo.* = ¿Lees a menudo

libros? No, desgraciadamente yo no tengo mucho tiempo, solamente puedo ocuparme de eso de vez en cuando.

- *Ĉefe* = principalmente
- *La matĉoj baldaŭ komenciĝos* = los partidos comenzarán pronto. El verbo *komenci* es transitivo, es decir tiene que comenzar algo. Ej. *Mi komencas legi libron* = yo comienzo a leer un libro. Si lo que comienza es el propio sujeto de la frase, ejemplo *la matĉoj komenciĝas*, es decir se comienza a sí mismo y no da comienzo a nada fuera de él, entonces tendremos que utilizar *komenciĝi*, que literalmente significaría “iniciarse”.

Ejemplo:

La infano komencas piediri = el niño comienza a andar.

La piedirado komenciĝas per mallertaj paŝoj = la marcha se inicia con pasos poco hábiles.

En la primera fase un niño ha comenzado algo (andar), en el segundo algo (andar) se inicia a sí mismo.


- *Rilate la lingvon* = En relación con la lengua, también puede decirse *Rilate al la lingvo*.
- *La lingvo devenas de la malnova norvega lingvo* = la lengua proviene de la lengua noruega antigua.
- *Kiel dirite, Ferooj estas aŭtonoma regiono* = Como se ha dicho / como ha quedado dicho, las Feroe es una región autónoma. *Kiel dirite* = como se ha dicho / como ha quedado dicho.
- *Ili celas al suvereneco* = ellos aspiran a la soberanía. *Celi* es aspirar, marcarse un objetivo, el cual se expresa con la preposición “*al*”, si se trata de un sustantivo. Para el caso de que sea un verbo, entonces simplemente se indica el verbo en infinitivo. *Ili celas sendependiĝi* = ellos aspiran a independizarse.

GENIUS



Kiam GENIUS PI renkontiĝis kun PAT







Serĉu kiujn ajn nombrojn ĉe <http://www.subidiom.com/pi/pi.asp>

"Mi serĉos jenan
cifer-katenon:
2 3 9 8 5 7 9 8"

Kie?

"Inter la decimaloj de la
konstanto π . Ni ĉiuj estas tie"

"Mi tute ne komprenas vin"

"La cifera sinsekvo 23985798
aperas en la pozicio
32.994.292-a en la
decimaloj de π . Guste ĉi tie:
50680953870966035631**2398**
57987835810342808153680 9"

Do, vidu: vi kaj mi jam aperas
en konstanto ekzistanta el
la komenco de la
tempo kaj universo"

Ne troigu! Ili estas
nur nombroj"

"Stranga maniero
koni knabon"

Turismi en ... HUESA (Jaeno)

Sude de la natura parko Kazorlo, en la provinco Jaeno sed tuj apud la limo kun tiu de Granado, troviĝas la vilaĝo *Huesa* (prononcu: Ŭesa). Ĝi stariĝas sur montara teritorio, plena de krutaĵoj kaj pinarbaroj. Jam kvar jarcentoj a.K. homoj ekloĝis tie, la loko estis tre grava por la ibera kulturo, ĉar ĝi troviĝis ĉe trapasejo inter la altaj granadaj ebenaĵoj kaj la naskiĝo de la granda rivero Gvadalkiviro. La romianoj, poste, fondis en la apudaĵoj kelkajn kampar-domojn, kies ĉefa celo estis la produktado de oliv-oleo. Kiam islamanoj alvenis en la Iberan Duoninsulon, la arabaj trupoj detruis ilin en la 9-a jarcento, tamen ili, poste, repopolis la tutan zonon kaj eĉ konstruis fortreson.

Meze de la 13-a jarcento, tiam preskaŭ ĉiuj ĉirkaŭantaj zonoj jam estis konkeritaj de la kastilia armeo, tamen Huesa restis ankoraŭ kiel islama enklavo sub la estro de Mohamedo Handon. Dum tiu tempo la kristanoj nomis la lokon "*Villarosas*". Verdire, estis tre malfacile konkeri ĉi tiun vilaĝon, ĉefe pro la konstruo de fortreso, gardita de montoj kaj de duobla murego.



Blazono de
HUESA

La vilaĝo restis sub islama influo ĝis la jaro 1455, tio estas, nur kelkaj jaroj antaŭ la definitiva venko de la kastilia armeo kaj la malapero de la granada emir-lando.

Rilate la originon de la nomo "*Huesa*", oni diras, ke la kastilia reĝino Elizabeto la 1-a, dum vojaĝo en Granado, trapasis la lokon kaj ŝi ekdiris, ke ĝi ŝajnis "*ostejon*" -en la hispana lingvo "*Huesario*", tamen ĉi tio eble estas legendo. Inter la 15-a kaj la 17-a jarcentoj la tuta loko nomiĝis "*Poyatos*", pro la nomo de la familio posedanta tie grandegajn bienojn. La ekkonstruo de novaj domoj tuj apud tiu bieno "*Poyatos*" estas la origino de la

nuntempa vilaĝo Huesa, kies enloĝantoj serĉis novan nomon malsimilan al tiu de la apudaj zonoj. Inter la antikva bieno “*Poyatos*” kaj la vilaĝo Huesa trakuris rivereto, hodiaŭ tiu rivereto estas la avenuo “*Andalucía*” en la vilaĝo.

La vilaĝo dependis de la apuda urbo *Quesada* ĝis la jaro 1847, kiam Huesa fariĝis municipo. Dum la 20-a jarcento la enloĝantaro pligrandiĝis, tiuj 600 enloĝantoj de la 19-a jarcento fariĝis 2.000 komence de la 20-a kaj eĉ 4.500 meze de la pasinta jarcento. La ĉefa ekonomia rimedo de la vilaĝo estas la ter-kulturado, oliv-arbaro, kvankam ankaŭ estas tre grava la produktado de espartaĵoj, tio estas, fabrikado de ŝnurojn, ŝnur-ŝuojn, korbojn kaj similajn objektojn pere de fibroj el espartaj plantoj.

Monumentoj

Preĝejo de la Virgulino de la Cabeza



La preĝejo de la *Virgulino de la Cabeza*, Madono tre laŭdita en la tuta jaena provinco, estas la plej grava monumento en Huesa. Temas pri konstruaĵo de la 18-a jarcento, poste de tempo al tempo restaŭrita. Estas eble vidi la turon de la preĝejo el ĉiuj anguloj de la vilaĝo.

Pro ties apudeco al la natura parko Kazorlo, en Huesa ankaŭ vi povos ĝui belegajn naturajn lokojn, kiel la groton de l’akvo, tie estas eble vidi belan akvo-falon.

Festoj

Sankta Silvestro – la 31an de decembro

Sankta Silvestro, honorata la 31-an de decembro, estas la patrono de Huesa. Jam dum la antaŭa tago huesa-anoj starigas la *kastelojn* de la sanktulo, temas pri brulaĵoj, ĉirkaŭe oni dancas kaj kantas. Dum la 31-a de decembro okazas procesio kie partoprenas ankaŭ standardisto, kutime oni ellaboras kaj donacas al amikoj kaj familianoj blankajn ringo-panojn.



Standardisto flirtigas flagon dum la procesio de Sankta Silvestro

La 25-an de aprilo, honore al Sankta Marko, tiuj paroj kiuj dum la pasinta jaro geedziĝis donacas blankajn ringo-panojn al tiuj kiuj partoprenas en meso honore al patrono.

Pilgrimado honore al la Virgulino *de la Cabeza* okazas dum la unua dimanĉo de la monato junio en la apuda vilaĝeto *Caniles*, apartenanta al municipo Huesa.

Fine, okaze de la Kristokorpa festo, oni starigas en la balkonoj belegajn altarojn faritaj el floroj, jen taŭga momento por viziti la urbon kaj ĝui ties belecon.

Gastronomio

La gastronomio en Huesa baziĝas sur manĝaĵoj ellaborataj per tritiko kaj ankaŭ per porkaĵoj. Tre originalaj estas la “spicaj farunaĵoj”. Ankaŭ estas tre konataj la nigraj sango-kolbasoj, ellaboritaj per sango el porko, fritita cepo, migdaloj kaj pano.

La plej tipa dolĉaĵo estas la blankaj ringo-panoj, kies origino estas la islama kulturo. Dum ĉiuj festoj en Huesa kutime oni donacas ĉi tiun ringo-panon al apuduloj.



Blanka Ringo-pano

*Venont-numere TURISMI EN
PULPÍ (Almerio)*



Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Manuel Fraile Corona
Sindikatisto kaj Esperantisto

Manuel Fraile Corona naskiĝis en Madrido en la jaro 1892. Ankoraŭ infano lia familio translokiĝis al Granado, tie li finis siajn studojn. Li eklaboris kiel labor-kontrolisto en la urbo Albacete. En tiu urbo li ekagadis politike en la socialisma partio kaj li fondis la ĵurnalon "El Trece". Pro sia politika agado en Albacete, tie li atingis la vic-urbestran postenon, li suferis atencon, kies videbla rezulto estis granda cikatro sur la vizaĝo. Pro siaj ĵurnalaj artikoloj li ricevis 33

kondamnoj, kiuj sendis al li ofte en la malliberejon aŭ en la ekzilejon al apudaj provincoj.



Manuel Fraile Corona
1892 - 1927

Okaze de unu el tiuj kondamnoj foriri el Albacete, li venis en Peñarroya-Pueblonuevo, minista vilaĝo en la nordo de la kordova provinco. La minista sindikato invitis al li prelegi pri la problemoj de la laboristaro. La sukceso estis granda kaj la estraro de la tiea sindikato proponis al li labori kiel sekretario en la sidejo de Peñarroya Pueblonuevo. Interkrampe, estas necese diri, ke tiutempe la nordo de la

kordova provinco estis loko, kies ĉefa ekonomia rimedo estis la karbaj minejoj. La labor-kondiĉoj de la ministoj ne estis tre bonaj kaj pro tio la sindikatismo estis ege forta en la tuta zono. Do, Manuel Fraile estis aktiva kaj sukcesa intertraktanto kun la franca entrepreno *Société Minière et Métallurgique de Peñarroya*, firmao kiu dungis la ministojn por elfosi karbon el la minejoj.

Unuamomente, Manuel Fraile ne estis favora al Esperanto, tamen lia granda amik-rilato kun Francisco Azorín Izquierdo, fama kordova esperantisto kaj aktiva socialisto en Kordovo, influis lin, do fine Manuel Fraile fariĝis fervora esperantisto. Li favoris la organizadon de kursoj de la internacia lingvo por la ministoj en Pueblonuevo del Terrible. Same, kiam en la jaro 1926 la sindikato kie li laboris oferis postenon por oficisto, unu en la prikonsiderindaj postuloj estis la kono de Esperanto fare de la kandidatoj.



Minejoj en Pueblonuevo del Terrible (Kordovo)

Manuel Fraile favoris ĉiajn agadojn de la socialisma sindikato en Peñarroya Pueblonuevo, li proponis la konstruon de malmultekostaj domoj por la laboristaro. Li estis afabla kaj klera homo, kvankam liaj diskutoj, kutime akraj, kun anarkistoj kaj komunistoj estis oftaj. Kiel ĵurnalisto li kunlaboris kun la kordova revuo “*Revista Cultural*”, kies direktoro estis alia fama esperantisto S-ro Francisco Serrano Olmo, kaj

oftaj kunlaborantoj samideanoj kiel Rogelio Luque, Francisco Azorín kaj Juan Serrano. Li sekvis siajn idealojn kaj opiniojn en ĉiuj aspektoj de la vivo, do, li ne edziĝis per religia ceremonio, sed pere de civila akto, nuntempe ĉi tio povas esti normala afero, tamen tute ne dum la 2-a jardeko de la pasinta jarcento.

Li forpasis june, apenaŭ 35-jaraĝa kiam li estis en Albacete por resaniĝi post terura pneŭmonio suferita.



Historia Arĥivo de Andaluza Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba ~ cordoba@esperanto.ac

Solvoj de la paĝo 16-a:

- *La aŭtomobilo **DE** mia amiko kostas multajn milojn **DA** eŭroj.*
- *Kiom **DA** mono kostas la aŭtomobilo?*
- *Oni povas diri, ke li estas ebriulo, li trinkas kelkajn glasojn **DA** viskio dum la tago.*
- *La profesoroj decidis krei grupon **DE** mineralogio, tie renkontiĝos grandan grupon **DA** mineralogoj.*
- *Sur la arbo troviĝas multe **DA** birdoj.*
- *En la urbo loĝas multaj esperantistoj, ili havas afablan grupon **DE** esperanto kaj de tempo al tempo renkontiĝas tie kelke **DA** ili.*

FLAMENKO

El Pele



Manuel Moreno Maya
El Pele

Ne necese ĉiuj elstaraj flamenkaj kantistoj naskiĝis kaj ludis dum la unuaj jardekoj de la pasinta jarcento. Flamenko estas ankaŭ nuntempa arto, kiu kapablas adaptiĝi al modernaj tempoj. Unue el tiuj modernaj flamenkaj kantistoj estas Manuel Moreno Maya, pli konata kiel *El Pele*. Li naskiĝis en Kordovo en la jaro 1954 ĉe malriĉa familio, do, dum sia infan-aĝo li devis kanti surstrate, ĉe flamenkaj rondoj kaj poste en modestaj spektakloj por atingi iom da mono. La kordova taŭroludisto Manuel Benítez “*El Cordobés*”, tuj post koni lin, nomis lin per la krom-nomo *El Pele*, kaj de tiam li estas ĉi tiel konata en la flamenka mondo.

Jam 15-jaraĝa *El Pele* atingis la unuan premion en flamenka konkurso en la vilaĝo *Cabra* en Kordovo kaj nur unu jaron poste en *Montalbán*, alia vilaĝo de la kordova provinco. Post kelkaj pliaj sukcesaj partoprenoj en konkursoj, li atingis du unuajn premiojn en la Nacia Konkurso de Flamenka Arto, la plej grava renkontiĝo de ĉi tiu arto.

Laŭ fakuloj, *El Pele* serĉas novajn horizontojn por la flamenka arto, sed ĉiam el la plej puraj radikoj. Do, kiam li renkontiĝis kun la kordova gitar-ludisto Vicente Amigo, nova mito de la flamenka arto

aperis. Ili surbendigis la diskon “*Poeta de Esquinas Blandas*” (Poeto de Molaj Anguloj) en la jaro 1990, tie troviĝas unu el la plej konataj kantaĵoj de la nuntempa flamenka arto: “*Vengo del Moro*”. En tiu sama jaro, la brita pop-muzikisto David Bowie, post aŭskulti diskon de *El Pele*, invitis lin kanti antaŭ siaj koncertoj en Madrido kaj Barcelono. Kuniĝis tiam du malsimilaj kant-stiloj: pop-muziko kaj flamenko.

Laŭ Agustín Gómez, historiisto de la flamenka arto... *El Pele estas flamenka besto komprenata laŭ la plej natura stato. El Pele posedas varman voĉon el maljuna kupro kaj li sentas la flamenkan takton. Li eniras en la misteron de la flamenko, tie li kapablas leviĝi senpeze, en sia serĉo de la lumo de la anĝeloj. Kaj tion li faras sen afektado, sen ekstravagancaj gestoj.*

Verdire, tuj post aŭskulti kantaĵojn de *El Pele*, oni komprenas, ke la flamenka estas muzikstilo kiu apartenas al ĉiuj por ĉiam.

*Ekzistas la turmento, tion mi scias,
poste alvenas la kalmo, tion mi scias.
Ekzistas la turmento, tion mi scias,
Poste alvenas la kalmo, tion mi scias.
Mi freneziĝas, mi volas scii ĉu tiu ciganin' min amas.
Mi freneziĝas, mi volas senti ŝian bruston apud tiu mia.
Mia brusto, mia brusto apud ŝia dorso,
ŝia dorso apud mia brusto, mia brusto apud ŝia dorso.*

VIZITU la branĉon pri FLAMENKO
en

www.esperanto.ac/pri-flamenko

Datum-bazo pri flamenkaj artistoj kun rektaj ligiloj al
Jutubo

ANDALUZIA KUIRARTO

Remojón Granaíno

La “*remojón granaíno*” estas unu el la plej konataj receptoj de la granada gastronomio. Ĉi tiu freŝa manĝaĵo, kiu povas esti konsiderata kiel salato, devenas el la araba receptaro. Ni ne povas forgesi, ke Granado estis islama urbo ĝis la jaro 1492. La *remojón* profitas la unuajn oranĝojn de la aŭtuno, krome, ĝi uzas andaluzian oliv-oleon, do, ĉi tiu manĝaĵo havigas sanigajn elementojn al nia korpo.



Jen la ingredientej:

- Oranĝoj
- Dispecigita gado. Gado estas sekigita, ne-salita moruo.
- Ŝenoprazo.
- Nigraj olivoj.
- Boligita ovo.
- Oliv-oleo.
- Salo, pipro kaj petroselo.

Jen la ellaborado:

1. La moruo devas esti sensaligita, oni povas rosti ĝin iomete.
2. Boligu la ovo(j)n. Estas necese atendi ĝis la momento kiam la ovo(j) estos tute malvarma(j).
3. Sen-ŝeligu la oranĝojn, tranĉu ilin laŭ maldikaj pecoj. Evitu la blankan parton sub la ŝelo ĉar ĝi amarigus la tutajon.
4. Sur telero tranĉu la ŝenoprazon laŭ maldikaj ringoj. Tranĉu ankaŭ la nigrajn olivojn, same laŭ maldikaj ringoj, kompreneble demetu antaŭe la kernon de la olivoj. Tranĉu la boligita(j)n ovo(j)n laŭ ringoj.

5. Aldonu salon.
6. Metu sur la tutaĵon la dispecigitan gadon.
7. Pulvore disŝutu la pipron kaj poste aldonu la petroselon.
8. Fine, verŝu oliv-oleon sur la tutaĵon.

Ĉi-recepta vortaro:



Oranĝo



Nigraj olivoj



Oliv-oleo



Gado



Salo kaj Pipro



Petroselo



Boligita ovo



Ŝenoprazo

Ĉu Vi deziras kunlabori kun la revuo?

Ne hezitu sendi Viajn kunlaboraĵojn: artikolojn, desegnaĵojn, informojn, ludojn....

Gazeto Andaluzia estas la plej veterana esperanto-publikigaĵo en Andaluzio, ĝi fariĝas tagon post tago kaj Via kunlaborado estas nepra.

Kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac

FERVOJISTA ANGULO

La oniska trajno

La Kompanio de Suburbaj Fervojoj de Malago estis belga entrepreno fondita en la jaro 1905. Ĝia celo estis la konstruo kaj ekspluatado de fervojoj ĉirkaŭ Malago. Ĉi tiu entrepreno funkciigis kelkajn liniojn, tiu unua estis fervojo de Malago al Vélez-Málaga. La ĉefa stacidomo de la kompanio troviĝis en la kvartalo

La Malagueta, poste oni konstruis malgrandan stacidomon, tiu kiu nuntempe troviĝas ĉe la enirejo de la malaga haveno.

Oni ekfunkciigis la fervojon inter Malago kaj *Vélez-Málaga* komence de la jaro 1908. La plej grava allogaĵo de ĉi tiu linio estis la fakto, ke ĝi trakuris laŭlonge de la marbordo, foje eĉ sur la plaĝo mem. Komence, oni pripensis daŭrigi la linion ĝis *Zurgena* (Almerio), tamen ĉi tiu projekto neniam realiĝis. La sola plilongigo de ĉi tiu linio okazis en la jaro 1922, kiam oni konstruis novan sektion kiu iris ĝis *Ventas de Zafarraya*, en la provinco Granada.



Verdire, ĉi tiu lasta sekcio estis malfacile konstruebla, pro la orografio de la teritorio. Do, estis necese konstrui dent-relajn trakojn. Ĉi tiu sistemo en Hispanio estis uzata nur en la Montserrat-valo kaj en la Nuria valo, ambaŭ trajnoj en Katalunio. Oni planis plilongigi la linion ĝis la urbo Granada, tamen denove ĉi tiu projekto neniam realiĝis.




Vagonaro alnomata “Onisko” trairas apud la marbordo en Malago

La linio al la vilaĝo *Zafarraya* funkciis ĝis la jaro 1960 kaj tiu de Malago al *Vélez-Málaga* ĝis aprilo de 1968. Unuamomente la lokomotivo funkciis dank’al vapor-kaldrono, poste oni uzis dizelajn lokomotivojn kaj dum la lastaj jaroj de la linio, trajnoj uzataj estis tiuj nomitaj “*aŭtotrajnoj*”, tio estas, mikso inter trajno kaj buso, ĉefe uzitaj por tiuj linioj kun malgrandaj distancoj kaj ne tro nombra veturantaro.

Vagonaroj uzitaj en ĉi tiu linio estis konataj kiel “*oniskoj*” ĉar ili aspektis kiel tiuj longformaj insektoj. Kurioze, ĉi tiun alnomon oni uzis poste por ĉiuj aŭtotrajnoj, ne nur tiuj de Malago.

Kio restas nun de tiuj linioj? Nu, relojam ne ekzistas, fine de la 6-a jardeko de la pasinta jarcento, ĉi tiu linio ĉesis funkcii. Tamen, kelkaj stacidomoj estas ankoraŭ videblaj, ili utilas kiel ekspoziciejoj,

turism-oficejoj aŭ eĉ bus-haltejoj. Ili troviĝas en malagaj vilaĝoj *Rincón de la Victoria*, *La Cala del Moral*, *Benajárafe* aŭ *Torre del Mar*. Eĉ kelkaj tuneloj estas ankoraŭ uzataj, ekzemple tiu de *El Cantal*, kiu utilas kiel trapasejo inter *La Cala del Moral* kaj *Rincón de la Victoria*.



*Hispana Amikaro de
Fervojistoj Esperantistaj*
fervojista@esperanto.ac

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La prizorganta Ento

Antaŭ kelkaj jaroj oni diskonigis jenan rakonton. La sciigo eĉ aperis sur ĵurnaloj kaj kvankam fantazio sendube povis pligrandigi la okazintaĵojn, tamen ĉi ĉio montras, ke “iu” prizorgas nin. Ĉi tiu rakonto okazis en la sevilaj kvartalo Triano, ĝuste en la tre konata strato “San Jacinto”, tie loĝas junulo, ĉefrolulo en nia historio, kiu dum-nokte sentis teruran malvarmon ene de sia ĉambro. Li serĉis malfermitajn fenestrojn, tamen ĉio ŝajnis esti normale, malgraŭ la malvarmo.



Dum la mateno, li konstatis, ke apud la lito lia patrino metis fotografaĵon de infano rajdanta lud-ĉevaleto.

- *Kiu li estas?* -li demandis al sia patrino.
- *Li estis via kuzo, mi metis la foton tien hieraŭ, ĉar fizike laŭ aspekte, li estis tre simila al vi.*

Dum la sekvanta nokto, la malvarma etoso denove aperis. Ĉi-foje nova afero okazis, dum-songe la junulo sentis, ke la figuro de infano alproksimiĝis al li. Li ne sukcesis fari ian movon, estas konata tiu impresio kiel “paralizo dum songo”, tio foje okazas, kiam ni songas terurajn okazintaĵojn. Fine, li povis lumigi la ĉambron, tamen neniu troviĝis tie, sed li vidis humidajn pied-ŝpurojn sur la planko. Rapide li vekis sian patrino, ŝi pensis, ke nur temis pri sufer-songo.

En la sekvanta nokto li decidis vesti ĵerzon el lano en la lito, por eviti malvarmon, li ankaŭ havis enmane poŝ-lampon. Kiam li ekdormis, li ŝongis pri infano kiu atente rigardis lin kaj bruege kriis, tamen la ĉefrolulo de nia rakonto ne kapablis aŭskulti lin. Jam matene, la patrino eniris en la ĉambron, ŝi vidis, apud la fotografajo, paperon kie aperis skribita jena teksto:


- *Ne iru !*

La patrino demandis al sia filo pri kio temis tiu skribaĵo. La junulo nur respondis per demando:

- *Kiel mia kuzeto forpasis? Ĉu li droniĝis?*

La patrino surpriziĝis, ĉar tio okazis antaŭ multaj jaroj, ŝi neniam rakontis al sia filo tion kio okazis. La junulo diris tiam, ke, kvankam li ne sukcesis aŭdi lin, dum-songe li komprenis, ke la kuzeto petis al li ne iri... sed kien? La junulo rakontis poste, ke li planis iri kun kelkaj amikoj en la kamparon, ĝuste en kabanon apud granda lago. La patrino petis al li ne iri, la junulo tion akceptis kaj li fine restis hejme.

Dimanĉe vespere, la junulo ricevis telefon-alvokon, tiuj amikoj kiuj pasis la semajn-finon en la kamparo suferis akcidenton. La akvo-fluo en la lago renversigis la boaton kiam ili navigis. Feliĉe ĉio solviĝis kaj neniu el ili damaĝis, tamen la morto estis tre proksima.



Krucvortenigmo

	1	2	3	4	5	6	7
A							
B							
C							
Ĉ							
D							
E							
F							


HORIZONTALE

- A. Ruĝa kolorilo.
- B. Denove. ■ Prepozicio montranta foreston.
- C. Maldika, plata ebena objekto el multevalora metalo.
- Ĉ. Finaĵo de akuzativo. ■ Adjektive, individuo, kies ecoj ne estas menciitaj. ■ Simbolo de gramo.
- D. Akuzative, ekzistanta tute interne, ne aperanta ekstere.
- E. Pronomo uzata por demandi pri afero. ■ Konsistanta el pura multevalora metalo.
- F. Plurale, jono kun negativa ŝargo.

VERTIKALE

1. Longedaŭra.
2. Sen la lasta vokalo, spirebla gaso kiu ĉirkaŭas Teron. ■ Akuzative, persona pronomo.
3. Plurale, agoj kaj vortoj de tiu, kiu venke rebatas per trafaj argumentoj.
4. Romana cifero. ■ Inverse, instrumento. ■ Cifero aŭ vokalo.
5. Akuzative, religio.
6. Respondi maljes. ■ Nombro da samspecaj objektoj.
7. Inverse, alia nomo de la ĉefurbo de Birmo.

Rebuso



- Kiun filmon vi vidis en la televido?

• **Solvo al la pasintnumera Krucvortenigmo.**

	A	B	C	Ĉ	D	E	F
1	K	A	M	E	R	A	O
2	U	N	U		A	G	R
3	L	O		★		L	A
4	P		A		O		T
5	A	S	T	E	R	I	O
6	N	E	O		K	U	R
7	T	I	M	P	A	N	O
8	O	Ĉ	A		S	E	J

• **Solvo al la pasintnumera Rebuso.**

En kiu ajn grupo tio estas necesa, se oni deziras sukcesi:

KUNLABORADO.

Aperas la litero B apud RADO. Do, kun la bo rado = kunlaborado.

Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝanĝus ion?

Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?

Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:

cordoba@esperanto.ac



HUMURO



La numero 117-a de nia revuo (Junio 2020) aperos tiam, fine de la monato junio 2020. Finfine ni akuratis la aperon de la revuo. Dankojn al ĉiuj pro via pacienco.

cordoba@esperanto.ac

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Seviljo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
cordoba@esperanto.ac

TTT-paĝo: www.esperanto.ac

www.esperanto-andalucia.info

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

Vizitu nian novan TTT-paĝon

aeu



Asociación Andaluza de Esperanto - Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto

Contáctanos Asoc. Andaluza ESPERANTO Grupos locales Gazeto Andaluza VENTO Andaluĝo, via celo PRI FLAMENKO Buscar Síguenos

esperanto.ac

Asociación Andaluza de Esperanto



¿Qué es el ESPERANTO?

Ĝi sidis un ŝuŝo de hie centos de aĝos que le Humanidad contara con un idioma para poder entenderse. La diversidad de idiomas sin dudar alguna es una riqueza cultural, pero también puede



¿Cómo aprender ESPERANTO?

Se estima que son necesarias unas 150 horas de estudio y práctica para aprender el Esperanto a un nivel avanzado. Por lo tanto estudiarlo a razón de una hora al día, se puede alcanzar un nivel



ANDALUZO, via celo !

ANDALUZO estas lenda ŝtato de Eŭropo kaj de Suda Eŭropo. Ĝi estas la administra vidpunkto de estas aŭtonoma komunumo de la hispana reĝlando. Ĝi havas sian propran registaron, parlamenton kaj

www.esperanto.ac

ESPERANTO en AndaluCía